Origine kaj traduke de Imre Szabó

Originalaj poemoj

****

Imre Szabó:
Baldaŭ Kristnasko!

Baldaŭ Kristnasko!
Ni devus ekvoji,
ĉar la infano
nepras naskiĝi!

Reĝoj Tri jam survojas,
do, eku ankaŭ ni!
Stelo zumas ekscitite,
la krimema mondo sin kaŝas.

Lucernas la kredo:
nepre naskiĝos tiu infano!

Do, ni eku!

Imre Szabó:
Strangaj ritmoj

Strangaj ritmoj kuras tra la koro,
jamboj, ditiramboj de la ploro,
lantaj spondeoj, viglaj amfibrakoj,
suno serena de senvibraj lagoj.

Mi nun lasas kuri la anhelon,
ĉasu ĝi la bonon kaj la belon,
restu ĝi fine, kiel la hundido
miaanime sola la ermito.

Mi respondus la demandon ĉu, ĉu,
mil-milfoje, kaj mi dirus: plaĉu
eĉ la vibrantaj, feblaj, etaj vortoj
de la finiĝo: elĉerpiĝis fortoj.

Imre Szabó:
Pasas la nasko

Pasas la tempo, sed vi ne pasas,
vi firme sidas en miaj cerbo kaj koro,
vi estas la eterne dolĉa, kara
kaj malhavebla, transmonda doloro.

Min portas plu la vojo,
mi esperas havi vin foje,
ĝis alvenos aŭtuno, vintro,
kaj defalos la folioj angore.

Min elŝvitis la frumateno,
kaj min absorbos la vespero,
same, kiel ĉiujn.

Donu al mi ideton!

Kiu plukantus la nekantitajn,
kies buŝo malfermiĝos,
kiam la mia femiĝos.

Estu li eterne laŭdata,
vesperoj se mornas,
matenoj se spronas
nin vivi plu,
kvankam min perdis jam,
elfaligis el siaj polmoj
la Eternulo.

Vivakre mi sonas, kiam
en sia forto malflamiĝos ĉi am',
ke ne plu, ke ne plu –
kaj ĉiam re- kaj rekomencu,
ĉar baras nin ĉirkaŭe la nokto.

Mi amas vin.

Kiom simple!

La suno venas supren.

Kiel krio ĝi venas
tra la ĉifono de nebuloj,
kaj abrupte ĝi trovis sin sur la kruco
de la mondotuto.

Kaj ekhumilas nun,
mi puŝas mian kapon
sub la polvon,
mi etendiĝus kun la ebena grundo,
kaj mi ŝirmus eĉ miajn herbojn,
kiuj abrupte ekkreskas neatendite.

Ho, kara mia,
foras la ĉielo, kiel la koro,
kaj foras ĝiaj tigoj, la tagoj, branĉoj
malsupren kliniĝantaj.
Helpu min supren!

Mi ne scias, kiel,
mi ne scias, kial!

Ne helpu min por krii,
mi ne krias por helpi.

Milde pasante ĉu ekzistas vojo por mi?
Ĉu mi ribelu frenezule,
daŭre montrante al via koro,
ke mi volas la plej belan pomon?

La pomoj putrixas, vane ili ruĝis,
ruĝa putro ilin atingas.

Mi amas vin,
sed mi ne scias diri,
kiel.

Kiel venas esafodo
lante ŝvebante pli kaj pli supren
ĝis la nivelo de leĝo,
por ke murdo estu sanktigita,
preskaŭ dia!

Kvankam dio ĉiam
nur kreas,
se ne estas io cetera,
almenaŭ doloron vivantan
kaj amon,
kiel la naskon.

Imre Szabó:
Sorĉkanto en bezono
Al Georgo Handzlik, la senbarba bardo

Okazas foj-foje, ke vi tiom solas:
la lumo forlikas el la korpo lante,
ekregas krepusko en la korprofundo
ekgrize, eknigre ĉion vualante.
//:Nun venu min helpi, ho eterna kanto,
varmigu la nokton brila Esperanto,
eterna amo mia,
eterna amo mia!://

Okazas foj-foje, ke konsolo mankas,
forvelkas esperoj, kiel aŭtunherboj,
paliĝas la veroj, vi singulte ĝemas
sub plagoj de sorto, sub kruelaj erpoj.
//:Nun venu min helpi, ho eterna kanto,
varmigu la nokton brila Esperanto,

eterna amo mia,
eterna amo mia!://

Okazas foj-foje, ke vin ĝojo sunas,
sed montri serenon mankas viaj vortoj,
sopiro, plezuro tiras vin el sombro,
tamen por karesi mankas viaj fortoj.
//:Nun venu min helpi, ho eterna kanto,
varmigu la nokton brila Esperanto,
eterna amo mia,
eterna amo mia!://

(Martin, 2007-05-26.)

Imre Szabó:
Egerfarmos
(Esperanto-tendaro de pentristoj, 2007)

Tristo de rikoltantoj en ŝiaj okuloj
mildiĝe, fortiĝe;
ŝia korpeto ekvibras, kiel
la animo tajde tremas-ĉitas:
ventblovita, -pacigita lago.

Estas nek kajo, nek suba ŝtono,
ondas nur la kampo,
la lumo surhavas vualon
el memoroj sonoraj belaj,
kaj ĝi senvestiĝas:
ĝi banas siajn enormajn formojn
en la ondoj verdaj, orblondaj, -brunaj.

Karulino, mia tristokula,
zorgema rikoltanto de vidaĵoj,
ĝis kiam vivas la penso, diru,
se ĝi ekiras sur tufoj de kotherboj
fajfante, siajn plumpajn membrojn
missvingante adoleskule,
kun konkeremo;
ĝi ne toleras prizonon de vidaĵo,
ĉar ĝi estas pli ol lumo de la ĉieloj,
pli ol grasaj ombroj de la tero.

Sankta Johano de Nepomuko,
vilaĝloke mur Johanĝo,
la akvoj forfluis de sub li,
nun li gardas la rartrafikan stratangulon,
kun apatia rigardo
li iĝas patrona sanktulo por ĉiu,
kiu nur volas.

La rikoltantoj marŝas kun flagaj kantoj,
sed la tristo enokule,
ondoj de la kampoj surpiede,
foj-foje svingiĝas la ĉielo,

kaj ne eblas finrikolti;
la rikolto neniam estas finita,
ili ĉiam malgajas,
vanas la kantoj,
vanas taŭzita anhelo de la animo,
vanas la disradia, aŭreoliĝa plezuro,
kiel de la stomakoĉirkaŭaĵo
ĝi radias elanon en la manon,
ĝi donas akron al la rigardo,
purpuron al la ekzisto.

Karulino, mia tristokula,
kien portas la penso?
Ni ambaŭ scias,
ke ne gravas...
Eternas nur la verkado.

Imre Szabó:
Li forpasis

Li forpasis.
Kun klinita kapo ni staras,
lasante lin foriri.
Ni staras senpove,
la senfortajn manojn ni fermas,
eĉ la larmojn
ne plu ni devižas.
Per rigidaj rigardoj
ni provas ankoraŭ
forĝi kadron super li,
lian forflirtan eston
se eble por reteni.

Ni staras, kulpokonscio okule:
ĉu ni estus povintaj doni ankoraŭ
al li vivon, nur ekvibreton da?
Ĉu ni lasis flagri la flamon en li,
ĉu ni helpis flagri en li
tiun flugilan flamon,
kiu per sia kredo lin levis,
se li stumble falis,
serene lin levis,
se malĝojo lin batis.

Kaj eĉ el la doloro li ekstaris,
la suferon por forgesi
li pensis pri la amiko, kiu fore
inter la heĝoj de jardekoj
atendas la kelkvican mesaĝon
malpezigante tiun suferon:
„Dankon pro la interesiĝo,
ni fartas bone,
la sano nin servas,

foje tiel, foje alie..."
Kaj venis la respondo:
„Dankon pro la demando..."

Kaj venis la tagoj
de malvastaj padoj,
kie eĉ returniĝi
preskaŭ maleblas.
Tamen oni devis returniĝi,
oni devis reveni,
ĉar farendaĵoj atendis,
ĉar iuj atendis, atendis
ĝislaste la konsolajn vortojn.

Kaj li sciis: vastas la tempo,
kaj la popolo de la tempo,
kaj vastas ĝia sufero,
kiun forviŝi malsufiĉas
eĉ se ĉiuj manoj kune…

Kaj estis festo por li
ĉiuj leteroj portantaj
la bonan novaĵon:
„Dankon, ni fartas bone..."

Se mi foriros, morgaŭ kiu respondos?
Kaj nun li demandas per mia buŝo:
„Esperantistoj,
morgaŭ kiu respondos?"

Paco vin akompanu!
Vi ne mortis,
nur foriris.
Kiu mortis, ties
flago defalas
kaj ĝi ne reflagras,
ties forfalintan verdan stelon
oni ne surbrustigas...

Li estis esperantisto,
kaj li restos jam tio,
ĝis vivos lia memoro.

Miklós Ábrahám – ni diros,
kaj ni komprenos: Esperanto.
Esperanto – ni diros,
kaj ni pensos pri Miklós Ábrahám.

Imre Szabó:
Estas paco

La kadavroj jam forportataj
nun oni lavas jam la trotuaron
la ruĝa akvo fluas en la kanalon
aŭdeblas la buldozeroj fore
nun ili ekiras kaj puŝas-puŝas
la teron en la grandan kavon
en kiu la ostoj purigos blankaj
disde la suferanta karno

Estis pura laboro
estas nun paco jam
florojn ĵetos la popolo
antaŭ la botojn
de la venkmarŝantoj

Neniu memoros tiam plu
pri la milda siringoarbusto
pri la hejmokaŝaj fenestroj
pri la invitaj dompordegoj
kiuj ĉiuj vomis la plumban morton
ankaŭ pri la serena ĉielo
neniu plu memoros jam
kiel ĝin plenigis bomboj

Ĉio komencigis pace
preskaŭ kaprice ŝerce
oni elektis en la ludo
la nigran ŝafon
kiu devis sin kaŝi
la aliaj serĉis lin
por malkovri
pasis la tempo,
kie en la diablo li estas
ĉiu devus jam iri hejmen
iuj jam eĉ iras
kaj tiam la aliaj retovis lin
kolere furioze
senindulge draste ili draŝis lin
fine ekfulmis la rapida klingo
disŝirigis la kriego:
Sed ni nur ludas! Sed ni nur...

Kiel la porko buĉota
ni mem donas nin al la manoj
de la buĉistoj
vane estas la invita vasta
kampo de rifuĝo
ni ne volas fuĝi
ja ni estas senkulpaj

ni forte scias, ke ni
estas senkulpaj senkulpaj senkulpaj

Nur la laboron vi perdis hodiaŭ
sed morgaŭ vi perdos la vivon
vi ne rimarkos kiel vi aperis
por dormi sub la pontoj
vi ne rimarkis kiel aperis sur vi
la uniformo la mortobotoj
vi estas senkulpa senkulpa
sed nun murdi aŭ esti murdata

Ni ĉiuj senkulpas estas sciate
tamen ie iam ni ekludis
ekludas false fuŝe
kaj ni mem staros ĉe ambaŭ
ekstremoj de la pafiloj
vico da nukpafoj
ni estas senkulpaj senkulpaj senkulpaj
stertoras-tondras la transvivantoj

La mortintoj milde-mute
purigas siajn ostojn
subplande profunde

Estas paco

Imre Szabó
Mi atendis vin

Mi atendis vin la tutan tagon,
denove tutan tagon,
mi frotadas la tagojn,
kiel rozarion
monaĥino klostroprofunde
inter la dikaj, mukozaj muroj,
en ĉi enorma premilo
lante fluetas la elpremitaj
vortoj de la preĝo
la masonaĵo de la muroj
estas preĝo de la antaŭaj
jam delonge foririntaj
al la lule lilia tiliejo
kun sia rozario
ili kuŝas tie sube
kun rozariaj manoj
virgaj senkulpaj senpensaj
kaj ili estas feliĉaj
pli grasas la herboj
super ilia kuŝejo,
la ĉielo estas pli fore

ol iam ajn,
du metrojn sube
ili resurektos
nepre ili resurektos
ĉar oni ellevos ilin
la psalmoj ellevos ilin
la psalmoj kiel larĝaj flagoj
ŝvebe rampos al la
gardostaraj arboj
al la arbaroj por vindi ilin
kaj engluti
kiel la apenaŭ moviĝanta
eterneco vermoplena
kaj iliaj ostoj iros
al la altaroj por sanktigi ilin
ĉiu gramo da osto valoros pli
ol tri gramoj da oro
Kaj nun mi staras en tiu ĉi premilo
kolosa liganta la karnon al la ĉielo
kie vakuas la sentoj
malplenokulaj anĝeloj flugadas
de nenio al imago
kaj reen...
Donu al mi pacon Sinjoro
permesu ke defalu tiuj sopiroj
kiel kardoj el la hundofelo
mi povu stari antaŭ vi
suverene sensufere
ho Sinjoro, lasu
ke mi elvomu la spasmajn tagojn
la spasmojn kaj la tagojn
ilin ambaŭ aparte
kaj malpleniĝinte mi sentu la ĝuon
de malsato malsato
kiun sopiras stomakmalsanuloj.
Lasu ke mi elvomu min
Ho, Sinjoro, senreste
mi frotadas la suferojn
grandgloban rozarion

Originalaj kantotekstoj

****

Imre Szabó:
Mi suspektas
(Kantoteksto)

Najtingalo kantis matene,
pri Vi kantis najtingal',
kaj ĝi sonas-sonas tuttage
//:en la koro ĝis sunfal'.://

Mia koro kantis matene,
pri Vi kantis mia kor',
kaj ĝi sonas-sonas tuttage
//:tra gajiĝo, tra angor'.://

La animo kantis matene,
pri Vi kantis la anim',
kaj ĝi sonas-sonas tuttage
//:najtingale tra la sin'.://

Mi suspektas, treme mi spertas,
najtingalo, kor', anim',
evidentas, plene tutcertas,
//:ke mi amas, amas Vin..://

Imre Szabó:
Vojaĝo eterna
(Kantoteksto)

Vojaĝo eterna:
animo animon
ĉasas konstante
por gajni intimon.

La leĝo eternas,
kaj ni ne esceptas,
kvankam ni foj-foje
alie perceptas.

Imre Szabó:
Venu kaŝe
(Kantoteksto)

Venu kaŝe,
silentpaŝe!
La mondo ne eksciu!
La mondo ne enviu!

En brakumo
de mallumo
la amo kore flamos,
la koro flame amos.

Venu brave,
ja ne grave,
eĉ se la tago lumas!
La mondo nur eksciu!
La mondo nur enviu!

Imre Szabó:
Malplenas la tago
(Kantoteksto)

Malplenas la tago.
Sola kareso ĝin plenigus,
sola, kara vorto
niajn animojn kunligus.

Malplenas la tago,
kiel trinkglaso renversita.
Sekas la animo
tiom je amo avida.

Plenigu la tagon
via intimo, via amo,
ĉar en la silento
froste malvarmas la flamo!

Malplenas la tago.
Sola kareso ĝin plenigus,
sola, kara vorto
niajn animojn kunligus!

Imre Szabó:
Eta sonĝo
(Kantoteksto)

Mi sendas al Vi etan sonĝon,
mi en kiu loĝas fore,
kaj en ĝin por kunesti iom
mi vin bonvenigas kore.

Ekstere kuras ventoj vagaj,
malvarmegas tre la mondo.
Alvenu kaŝe, silentpaŝe,
kaj intimu ni sen honto.

Nun vidu tiun etan sonĝon,
estas ĝi por mi kastelo!
Alvenu nepre, kara mia,
sen Vi mankas la espero!

Mi sendas al Vi etan sonĝon...
Mi sendas al Vi etan sonĝon...

Poemtradukoj

****

Ágnes Ágai
Portretoj el la ĵuspasinto

N-ro 1.

Li estis personeco.
Timata, estimata.
Atentokapta, se li ekparolis,
kaj ĉiu serĉis kaŭzon, se li mutis.
Li gravis en koncernaj rondoj,
kvaranguloj kaj ceteraj formacioj.
Lia opinio gravis (kaj male).
Li multe pezis en la peso.
Oni kalkulis pri li.
Precipe en profilo oni vidis
lian vangokonturon – li montris tiun –,
la alia, kiel luno.
Lian privatan vivon
subpremis la socia.
Li ne diboĉis kaj ne ĉasis,
li ne societumis,
por ne mencii la ceterajn.
Li ŝanĝis la ideojn kaj cerbumis.
Tio estis lia ĉefokupo.
Li ne ordonis, ne preskribis.
Siajn ideojn li transdonis, publikigis.
Foj-foje kiel ordonojn.
Li verkis monologojn aŭ dialogojn
kun imagitaj amikoj aŭ malamikoj.
Li disputis kun li, senkaske li akuzis
la ideologiajn mispaŝojn aŭ erarojn.
Se iu sentis sin trafita,
li kontentis kiel celpafisto.
Poste li malaperis.
La tempo lin forlavis.
La morto lin forrabis,
ĉu prefere diri, ke lin fortrenis?
Foj-foje li estas menciata,
sed senepitete.
Ankaŭ la epitetoj forfrotiĝis.
Lia memoro estas negardata.

N-ro 2.

Li estis dika knabo,
moviĝis li malfacile,
sed parolis tre facile.
Li konservis ambaŭ trajtojn.
Li estis servema kaj sagaca,
se volontulon oni serĉis,
li aliĝis sinpropone tuj,
eĉ nesciante al kio.

La tekojn de profesoroj
li portis malantaŭ ili,
li portis kafon el bufedo,
pri iliaj ĵercoj li ridegis.
En festaj okazoj
li prezentis festparolon,
li entuziasmigis, deklamis fervore.
Li fariĝis referanto, ĉefreferanto,
ĉe Ĉefimpekso ĉefĉefgvidanto,
ĉe prezidento ĉefkonsilisto.
Li prezentis, proponis,
referis, preferis
kaj krakigis la ro-sonojn.
Li alparolis la evoluigon de l' eksporto,
la Danuban ŝipveturadon,
la militan teknikon,
la varmiĝon de terglobo.
Venante de konferenco
li deklaris la unua.
En tiaj kazoj mi kutime diras – li diris,
kaj li diris, kion li kutime diras.
Li ŝatis vojaĝi
je vetero- kaj reĝimoŝanĝiĝoj
eĉ malproksimen.
Li ŝatis reveni,
en la flughaveno alfronti kameraojn.
Li havis bonajn rilatojn
kun la ĉiama potenco.
Gaje li mortis, kaj li dankemis
pro la belaj paroloj ĉe la katafalko.

N-ro 3.

Mallarĝa ŝi estis, diafana,
ostoj en maldika haŭtbindo.
La longaj fingroj sur la nigra-blankaj
klavoj kun ekscititaj saltoj dancis,
kaj ili fulmtrafis kiel falkoj.
El la frunto ŝi reĵetis la hararon.
Ŝi ludis sen notoj, fermante la okulojn,
kurbigante la dorson,
forigante ĉiun mondan bruon.
En ŝia ĉambro ŝirmila lampolumo,
mortmasko de Beethoven, libroj,
skribaĉplenaj, flaviĝintaj muziknotoj.
Tra la loĝejo svingis amara fumodoro,
surlite kusenoj, surpargete franĝaj tapiŝoj.
Ŝi vivis sola en verdeska duonombro.
ŝiaj kunuloj estis
testudo kaj arĝentece gapantaj fiŝoj
en akvario sub la fikusoj.
Ronrono, la kato jam nur kiel memoro.
Surgluiĝis al ŝi la soleco, kiel
traŝvitita vesto al la korpo.

Kvankam ŝi estis bela, proprakaraktera,
el la vizaĝo vasta, profunda okulparo
radiis kun malseka brilado
demande, mire, komprene, instige.
Ĉu ŝin iu kisis iam
sovaĝe, pasie? Kiu scias?
Ŝiaj lipoj: maldika, pala haltostreko
sub la fajne vibraj nazoloboj.
Ŝia pasio ekardis nur sur la piano,
dumlude ŝi baraktis, ŝrikis,
konvulsiis, kantis,
poste ŝi ekstaris
kvazaŭ vekiĝinta el dormo,
al la publiko ŝi mansignis psit-on
por ne ĝeni per aplaŭdo
la silentiĝantan belan harmonion.
Ŝia kliniĝo estis humilo kaj dankemo.
La maldikega korpo komplimentis tiel
antaŭ la arto riĉe fruktanta.
Ŝi mortis forsvinge kiel fumo,
ŝi forsvingis super la tombo.
Sonis la rekviemo,
brubatis al ĝi krude
la malsekaj terbuloj.
Ŝi silentis kaj ridetis.
*Allegro, ma non troppo. Silenzio.**

(Ne tro rapide. Silenton. – itala)*

N-ro 4.

Li naskiĝis sciencisto
kun okulvitroj, aktujo, leksikonoj.
Li lernis legi antaŭ ol iri,
per la komencaj skribaĉaĵoj
li verkis disertaĵon
pri kompleksa difuzio
de divergaj kohezioj.
Sur ludplaco oni vidis lin neniam,
pri pilko li sciis tiom nur, ke
ĝi estas solido kun sfersurfaco
uzata por piedfrapo.
En societo li balbutis konfuzite,
la poenton de ŝercoj li ne komprenis,
kaj li demandis, pri kio ridi.
En la abiturienta ekzameno hazarde
li sidis sur la lokon de l' prezidanto.
Danci li ne sciis, liaj polmoj ŝvitis,
li rakontis pri siaj esploroj aŭ silentis.
Li timis la knabinetojn klaĉajn,
li ĝeniĝis kun pli aĝaj virinoj,
li kisis manon al la putinoj
kaj pardonpetis pro la antaŭvidata fiasko.
Nur sur la podio li bonfartis,

sur pulpitroj, en kunsidoj kaj konferencoj
malantaŭ la longa tablo li ripozis
inter la statuoj de grandaj antaŭuloj
kaj ornamitaj kolonoj.
La kolegojn li malamis kun afabla ĝentileco,
sed kun rekono li aludis ilin,
kiel la dirigento almontras sian orkestron.
Li ŝatis disĉiplojn strebajn, ruĝiĝantajn,
kiuj akompanas lin ĝishejme
kaj diligente notas, kion li diras.
Lin ĝenis mikrofonoj kaj kameraoj,
la turniĝanta magnetofono,
kiam oni lin demandas.
Li subtaksis la sciŝajnigajn reporterojn,
lin ne interesis la kara publiko.
Li akiris la titolon doktoro de doktologio,
li alte taksis siajn premiojn kaj ordenojn
purigante ilin propramane.

Li manpremis kun la ŝtatestro,
sed li stumblis en la ruĝa tapiŝo.
La politiko lasis lin indiferenta,
li sciis tiom, ke ni
ne vivas en monarĥio,
kaj la rusoj jam elmarŝis.
Li havis kelkajn infanecajn pasiojn:
li amis la krudan glukozon,
kaj, se oni ne vidis lin,
li turbon kurigis sur la planko.
En la televido li ŝatis Freĝon kaj Beĝon.
Lian loĝejon purigis Rozinjo, la okaza servistino,
kun kiu, tre malofte,
li establis seksajn rilatojn.
Ankaŭ en la malsanula lito ŝi flegis lin,
ŝi elmetis la kolorajn kapsulojn,
skribante por li grandlitere,
kiam, el kiuj kiom gluti.
Li nur rigardis ilin nesciante,
kial ili estas tie.
Lia nekrologo jam delonge
kuŝis en redakciaj tirkestoj,
ankaŭ la funebra parolo pretis delonge,
kiam ili kortuŝite aŭdis la neatenditan sciigon.
"Funebras la scienca vivo!"
La familion reprezentis nur Rozinjo.

N-ro 5.

Kun densa, nigra hararo li naskiĝis,
liaj ĉielbluaj infanaj okuloj
baldaŭ ŝanĝiĝis je nuksobrunaj.
Lia unua vorto estis: kial?
Li ricevis respondon neniam.
Ĉiu pensis, ke li iĝos rabeno,

Li cerbumadis, preĝis kaj legis.
Kun la infanoj li ne ludis,
li klarigis al ili,
kaj tiuj gape lin aŭskultis
kvankam nekomprene, kion li diras,
sed li parolis bele kaj mistere.
En sia biblioteko, kiel burgestro li vivadis,
volumoj dikaj lin defendis, dum nur eblis.
Li skribis, tajpis,
la okulvitroj glitis sur la nazon,
kiu estis dominanta kaj difina.
Neniu suspektis, ke li politikas,
vizitas kunvenojn,disdonas flugfoliojn,
afiŝas kaj oratoras.
Poste li venis hejmen, foliumis vortarojn,
li transplantis klasikulojn
en finno-ugran grundon.
Li verkis studojn kaj monografion.
Lia internacia famo hezitigis
la sekuristojn, kiuj
observis ĉiujn liajn paŝojn, kaj
atendis nur la konvenan eblon.
La familio lin rigardis sciencisto,
nur la edzino timvekiĝis,
ĉar ŝi sonĝis ion malbonan.
Tial li malkovris ĉion
petante komprenemon kaj toleron.
Miaj koro kaj animo
estas por la laborista klaso,
li diris al la ŝokita familio.

Kiam en dimanĉo marta
*la unuaj botoj Wehrmacht-aj**
paŝis sur la ponton Budapeŝtan,
li tuj sciis, ke ĉio finita.
Post kelkaj tagoj oni frapis sur la pordo,
*al Heil Hitler** li respondis Guten Tag.****
Lia valizo enpakita
staris ĉe la litpiedo.
La hungaraj soldatoj traserĉis la loĝejon,
la germana rigardadis la bibliotekon.
Li petis kvin minutojn antaŭ ol ekiri.
Li kisis ĉiujn familianojn,
li paŝis en angulon de la ĉambro,
li submetis la preĝmantelon.
La soldatoj atentis kun mano surarmile.
Ŝema Jisroel, Adonaj elauhenu,
*Adonaj ehhod**** – li zumis.*
Li demetis la mantelon, kaj kiel
dommastro gaja li diris:
sinjoroj, ni povas iri!
En Dachau li fine adiaŭis la mondon.

(Nomo de la armeo de Hitler.*
*** Vivu Hitler! – faŝista saluto germana.*
**** Bonan Tagon! – germana.*
***** Aŭdu Izraelo, eterna Dio, unusola Eternulo! – hebrea)*

N-ro 6.

Li ne estis skulptita el malmola ligno,
sed li malmoliĝis.
Origine li estis mola
sed elasta, je varmo li dilatiĝis,
je malvarmo li maldilatiĝis.
Lia tanita vangohaŭto,
lia faldokovrita frunto,
en lia lipangulo
la duobla krutaĵo,
ĉio ĉi estis nur masko,
erariga grafikaĵo de l' tempo.
Li komencis kiel revanta naivulo,
li sopiris je mondo bela kaj egaleca,
kie ĉiu valoras tiom,
kiom li prezentas,
kaj ĉiu povas prezenti tiom,
kiom li reale valoras.
Lin doloris la malriĉo,
lin vundis la humiligo,
la etendata mano, kiu
anstataŭ pugniĝi
petegas por almozo.
Li kuŝis inter herboj kaj surkubute
poemojn skribis en kajero helicdrata.
Li ŝajnis milda,
sed al "Ĉesu, ne buŝumu!"
tro forte svingis lia pugno.
En la ĉelo li kvarope
sin gratis kaj diskutis.
Liberiĝinte li komencis drinki,
kaj li legis ĉion akireblan.
Li iĝis organizita laboristo,
konscia, malmola, taŭgulo.
Oni sendis lin lerni,
li baraktis kun la fremdaj vortoj,
kun la ornamoj de komplikaj nocioj.
Li fariĝis politika oficiro,
enbataligebla ankaŭ en ideologia fronto.

Li ne longe restis ankaŭ ĉi tie,
li diris sian opinion,
li pensis, ke tio estas lia tasko.
La ĉefo ne pensis tiel.
Li estis metita en malvarmejon,
li sidiĝis skribi la rememorojn.
Li primokas la epokon
kaj ties spiriton,

kiun ĝi reprezentas.
Li senvualigas,
sed li devas vidi,
ke la afero jam senvualiĝis.
Ekde tiam li vivas vilaĝe,
sur la herbejo li verkadas poemojn,
foj-foje li vinas,
kaj se li ebriiĝas,
kun nebulaj okuloj li rakontas
al la kompanoj
pri la malnovaj belaj tempoj,
kiam li ĉeffiguris,
same kiel Johaĝjo*.

* Aludo pri János Kádár, iama unua sekretario de HSLP.

N-ro 7.

Li estis amuzmajstro, kara, petolema,
nebulkapa ŝerculo.
Li fajfis, kantis,
produktis ŝercojn
kaj prelegis en kafejoj.
Monon li havis aŭ tro multe,
aŭ neniom.
Li elspezegis aŭ pruntepetis,
kaĵolis.
Li ludis la amanton protagonistan
surgenuiĝe, petegante,
sed li malfruis aŭ forgesis
la arde deziratan rendevuon.
Li dancis bone, li volis iĝi filmaktoro,
iaspeca Pál Jávor.*
Li ne povis iĝi tio,
ĉar li havis laŭrasan apartenecon.
Dum tempo oni lin kaŝis en la dangero,
sed oni kaptis lin, ĉar li laŭtadis.
Li demandis, ĉu doni aŭtogramon,
sed la policano ne petis,
sed portis lin al la policejo.
Li fuĝis, iris hejmen,
sed per SAS-flugilo** li estis reinvitata.
Oni portis lin malproksimen.
Li sendis poŝtkarton.
En vino estas la vero. En vino la konsolo.
Inter la ŝtonminejanoj li imitis Hitleron,
Mussolinion kaj la hungaran ĉefstabon.
Li furoris, oni ridis,
aŭrore ili devis fosi kavon.
Ili estis dekope: la amuziganto
kaj la dankema publiko.
Li fosis la tombon, kaj senrimarke
li kaŝis sin en ĝi, li ŝutis teron sur sin
por kredigi, li estas mortinta.

Sube li boris truon, kaj
ŝvitante li elgrimpis.

Bele, malrapide, tempohave,
per iom da partizana helpo
*li hejmen promenis el Bor.****
Ĉu li pravis, ĉu ne?
Tiel li rakontis.
Liaj historioj largiĝis post tempopaso
kaj koloriĝis.
Liajn historiojn Oral poste
filmigis.
Li mortis en Cansas City,
okdeknaŭ-jara.
Li falis desur seĝo drinkeja,
kaj li frapis la kapon al la tero.
Sennombraj vidvinoj lin priploris.

** Fama hungara filmaktoro inter la du mondmilitoj.*
*** SAS – mll. de la hungara Sürgős! Azonnal! Sürgős! ['Urĝe! Tuj! Urĝe!'], la mozaikvorto cetere signifas: aglo. Envokilo milita, al kiu oni devis aliĝi ene de 24 horoj.*
**** Malbonfama koncentrejo por labordevigitoj. Tie estis ankaŭ la fama hungara poeto Miklós Radnóti.*

Ferenc Juhász:
Vizi-benata vivo mia

Miraĵ, miraĵoj kaj vizioj,
sovaĝaj jelpoj kaj plorkrioj!

Murmuras vento mondotruda
en mia skelethalo kruda.

Sencèse tremas tra la karno
vizio febra de ekzist-alarmo.

Per drakodentoj mordas en la kor'
terur' mirakla pro la paso for.

Tempie fajrobru' martelas,
el arterioj sin elŝtelas

por fali al la nokto pala,
kiel sangbarbo prastelara.

En nuko meteoroj sin preparas,
metalo-vestaj amasegoj aras,

kun kaskaj kapoj, kirasitaj kavaliroj
de mondnovigaj militiroj.

Mi sentas nudajn rokojn de l' doloro,
sur ili floroj disaj: la pudoro,

Paroli puron, simplon vortajn,
priplori forpasantojn mortajn,

jubili ĉiujn naskiĝantojn,
de frosto savi kreskiĝantojn,

por ruĝa, blinda bebo esti korbo,
por adoleskaj rozoj pajlo-volvo.

Nur kiel mia patro estis,
kiu mem la pureco estis,

li donis la monon hejmen sen restoj,
ĉapelon solan havis por la festoj,

ĝis februare la krepusko
ŝtonigis lin je man-al-brusto,

la nazon al li morto ĉizis pinta,
kiel krajonon li, ekvojaĝonta.

Larmguto pura, milda vol' li estis,
ĝis lin la ftizo fordigestis.

Sed ondas mi, kiel la maro
salivbatata al rok-idolaro.

sur herbotig' de ĝemo vibras larmo,
la kant' en buŝ' de Jobo sakrad-svarmo.

Neniam sentis mi vizi-sopiron,
sopiris mi nur solon, nur azilon.

Sopiris mi nur simplan, puran fidon,
savantan ĉiun povran homan idon.

Ekpompi, kiel la floraro,
kaj morti, kiel la floraro.

Al la alia min alligi,
ne per vizi' min forbruligi.

Serene vivi sub lumarko,
fermiĝi fine sen rimarko.

La dentoj vian koron zonas,
kiel ŝafidon aglo spronas,

kiu surportas ĉi demonon,
kiel la fajran fero-kronon,

kiel inundon lafan val' ravina,
ardanta Georg'-Dózsa*-la-virina!

Kiu sursorte portas pene
stalonan kapon mian treme,

En fundo floras viziaro,
fosfor-fabeloj de l' doloro,

lumo-petalaj, terur-belaj,
lantegajn ŝarko-ŝvebojn pelaj,

tremantaj molaj trist-arbejoj,
lumantaj bluaj sonĝ-ombreloj.

Sed grave premas min impostoj,
galaksi-serpent-skelet-vostoj

eksplod-krepuske pendas kore,
erciĝe, pli kaj pli rigore.

Kaj nur vin benas mia sino.
flugiloj oraj de l' destino,

kiel vaksrozon la limako,
nin kovras profundmar-stomako,

la frunton pompan stelgalone,
glatigas vi per fingroj mole

la ŝvelaĵplenajn, fajrajn jarojn,
kiel avino la glandarojn.

Kiun trahurlas ĉi mirakloj,
kiel ĝardenon ŝtormo-agloj,

kiu eltenas home ĉiam
vizi-benatan vivon mian.

*) Estro de kamparana ribelo en Hungario en 1514. La ribelo estis subpremita, kaj Dózsa ekzekutita, laŭrakonte sidigita sur ardanta trono.

János Lukáts:
Arĝenta ponto
(Ezüsthíd)

Pli kaj pli enen naĝis mi kuraĝe,
silentiĝis bordo – ekparolis ondoj,
la arĝentponton celis mi vizaĝe,
kiu eternas en revenaj rondoj.

Miniaturaj mil lampetoj brilis
(sur mil-mil ŝaŭmoj la disperla lumo),
la vasta vojo sorbe min altiris
kuraĝe naĝi rekte al plenumo.

Sed ombra akro jen, abrupte tranĉis
la luman vojon, mia sonĝ' disfalis,
moleo ŝtona bare tie transis...
Mi returniĝis, kaj mallum' ekaris.

Sándor Petőfi
Satteda sklaveco
(Megúnt rabság)

Ĉiun eblan eblon
faris mi sen fin'
ĉase la esperon:
ŝi ekamos min.

Fajro inundanta
estis la anim'
domojn digestante
kura al senfin';

kaj mi iĝis flamo
varma kun tener'
por paŝtistoj pacaj
en aŭtunvesper'.

Estis mi torenta,
roka akvofal'
en disŝiriĝanta
bruo de ŝaŭmar';

kaj mi iĝis rojo
muta pro mildem',
plezuranta pri la
borda florĝarden'.

Estis mi rokfrunto
alte en mister',
kie loĝas tondraj
fulmoj de koler';

kaj mi iĝis bosko
sine de la val',
kie sonas tristo
de la najtingal'.

Estis mi... kio, do?
Kio iĝis mi?
Kaj la knabineto –
sen-sen emoci'!

Tio kostas tro da!
Faros ĝin ne mi!
Al ofero tia
pitas la premi'.

Amo, vian ĉenon
mi deĵetas jen.
Kara ĉeno, vere,
sed tamen nur ĉen'.

Do, nun fluge flugu
ho, mia anim',
kien vin libero
tiras: al senfin'!

Debrecen, decembro 1843

Sándor Petőfi:
En Transilvanio
(Erdélyben)

Vagadas muĝe la aŭtuna vento.
Bruetas krake sekaj arbofrondoj,
kiel katenoj de la arestito.
Silentu, vento muĝa! Mi parolas!
Se vi ne mutos, mi vin superkrios,
kiel tempesto la virinan ploron.
Unu nacio kaj du landoj aŭdu,
kio silente ĝis nun en mi bolis,
kion el brusto nun mi disflugigas,
kiel vulkano bruligitajn ŝtonojn.
Jen en mi bolis, tio min doloris:
du landoj estas por nacio unu,
kaj ĉi dulanda estas la hungaro!
Dezerto tial estas la animo,
dezerto trista, kie loĝas tigro:
kolero sanga- kaj braĝantokula.
Ĉi sovaĝbesto kiomfoje rompis
silenton noktan de mia soleco
hurlante vaste tra l' anim' dezerta! –
Kiu diablo igis nin disiĝi,
dissiri tiun sanktan ĵurleteron,
kiun subskribis la prauloj gloraj
trempante glavon en la propran sangon?
Ni dissiriĝis, ĉi letero bela
iĝis ĉifonoj, kiujn forbalais,
en koton tretis muĝo de jarcentoj.
Piedtretataj ni alsendis plorojn
kaj vekriegojn en ĉielon altan,
sed niajn plendojn ĝi ne plu akceptis.
La sklavojn ne plu pretas ĝi aŭskulti,
ĉar kiu lasas jugi sian kolon,
tiu meritas ĝin sufere porti
fine falante sub la skurĝobatoj.
Se ni kuntenus nin, la mondo nian
famon rekonus: foraj ni ne estus
el la preĝejo, kie por nacioj
grandaj incenso brulas de estimo.
Nin kuntenante ni ne devus viŝi
tiom da larmoj el okuloj niaj
foliumante per tremantaj manoj
la nigrajn paĝojn de la historio.
Polveron, kiu staras unusola,
forblovas pita vento, elspireto;
sed se polveroj kunfandiĝas kreske,
se la polveroj formas fine rokon,
eĉ tempestego ĝin ne plu movetas!
Pripensu tion, ni hungaroj disaj,
kion mi diris - nova ne, sed vera.

La skua vento de l' eventoj nun ne
blovas momente, kaj ĉiuj polveroj
sengene kuŝas en sekura loko;
sed se atakos vento antaŭ ol ni
fandiĝus, ĝi nin ĵetos poreterne
en ĉiujn partojn de la mondo vasta,
kaj ni neniam povos nin retrovi.
Ni strebu! La jarcento ja gravedas,
naskiĝos tagoj grandioze gloraj,
dangeraj tagoj de la mort' kaj vivo.
Ni plektu manojn, por ke ni ne timu
tremante, se alvenos la gigantoj!
Ni ĵuru per ĉi man-en-mano sankta;
ni ĵuru fidon, ho nacio kara!
Kiu unua donos manon, tiu
havu rekonon, dankon kaj gloregon;
Kiu akcepti ĝin hezitos? Kovru
polvojn de tiu la malbenoj ĉiuj,
kiujn sur niaj tomboj idoj plantos
anstataŭ florojn de estimo. Idoj,
ni poreterne kiujn fikripligis.

Sándor Petőfi:
Mia vespero hejme
(Egy estém otthon)

Vinumis mi kun patro,
jes, trinkis la bonul'.
Ho, lin se benus Dio,
almenaŭ foje nur!

Delonge mi ne hejmis,
kaj mi ne vidis lin,
li dume maljuniĝis –
la tempo urĝis sin!

Pri ĉio ni parolis
bonorde laŭ alven',
eĉ pri aktora arto
aperis fine tem'.

Mian "metion" sentas
li eĉ nun granda pik',
la antaŭjuĝojn tempo
ne portis al nulig'.

"Nu, aĉa vivo estus
la komediumad'!"
Miajn oreojn tuŝis
tia elkora flat'.

"Certe vi multe fastis,
atestas pala vang',

Kaj miajn vinokantojn
mi citis kun fervor',
kaj li ridegis, kaj tre,
tre ĝojis mia kor'.

Sed li ne taksas alte,
ke verkas lia fil';
por li tiaj aferoj
missencas sen util'!

Sed kial miri tion!
Viandbuĉado nur,
pri kio li komprenas!
Sciencoj estas nul'.

Kaj kiam elĉerpiĝis
botelo de la vin',
mi ekverkadis, kaj li
dormi retiris sin.

Sed tiam cent demandojn
starigis la patrin',
mi ĉesis la verkadon
por prirespondi ŝin.

Kaj aris la demandoj
sinpuŝe al senfin',

vidi vin transkapiĝi
plezurus mi kun dank'!"

Lian parolon fakan
mi aŭdis kun silent',
por tia ŝtipkapulo
ja vanas argument'.

tamen tiuj demandoj
tiom gajigis min,

ĉar ili ĉiuj estis
speguloj de sincer':
mi havas plej amantan
patrinon sur la ter'.

Sándor Petőfi:
En patrujo
(Hazámban)

Ebena lando kun orspik-ornamo,
leĝere supre la fatamorgano
prezentas ŝvebe gajan fe-ludilon.
Ĉu vi min konas? Konu vian filon!

En ombroj de ĉi-poploj mi ripozis,
antaŭ longege tio okazis,
dum superkape tra la aŭtunaero
de viaj gruoj flugis V-litero.

Kiam sur sojlo de la praa domo
mi ĝison diris kun rompita tono;
la lastajn benajn vortojn de l' patrino
disportis jam la ventoj al senlimo.

Jarvico longa de tiam aperis,
jarvico longa de tiam pereis,
per ĉaro de fortuno ŝanĝiĝema
mi vagis tra la mondo surpriz-plena.

La vivlernejo estas mondo granda.
Tiom da ŝvito estis forfluanta,
la vojo krute kuras, malebenas,
kaj oni ofte en dezerton venas.

Kiel neniu, mi ja tion konas,
mi, kiun sperto ja ĉiam admonas
artemizion donis ĝi malhele,
mi pretas trinki morton ja prefere.

Nun la malĝojon longan kaj doloron,
kiuj oftege tuŝis mian koron,
kaj la memoron de ĉiu torturo
dislavas sankta larm' de ĝojpuro.

Ĉar kie en la mola lulilsino
gustumis mi la lakton de patrino,
plensune brilas vi al fidelanto,
al via filo, kara patrolando.

Sándor Petőfi:
S-ino L.
(L-né)

Kreinto mia! Ĉiopova!
Reportu la momenton saman,
kiam ĝi-damo sentis amon
unuan, la unuaflaman;
kiam sur ŝiaj lipoj tremis
konfeso, la unua sankta,
estu mi, kiun kisi vokas
ŝia rigardo invitanta!

Kion mi pagu?... Prenu mian
vivoprintempon dudekjaran,
kaj prenu el mia futuro
promesolandon malavaran;
kaj se mi povos al ĝi eli,
kaj vi feliĉi donos senton,
el ĝi-felicxo ĝi elmonda
deprenu plenan jarcenton!

Sándor Petőfi:
Malgajite
(Boldogtalan voltam)

Mi tra l' tuta vivo
vivis malgajite;
min konsolas nur, ke
tute senmerite.

Mi malgaja estos
jam ĝis la sepulto;
min konsolas nur, ke
mankas ne tro multo.

Vane vi parolas,
logojn vi mencias –
mi ne longe vivos,
mi jam certe scias.

El la dramo de András Sütő: Palmomanĉo de ĉevalkomercisto

Ĉu estis ĉu ne estis plag'
Nigraĉevale flugis plag'
En Kolhaasenbrück
Ĉevalvendiston
Miĥaelon Kolhaas atakis plag'

Surpriz-abrupte tujas plag'
Sur virĉevalo rajdas plag'
Ho, ĉar surprize
Neanoncite
Nigra-virĉevale galopas plag'

Sed malrapide pasas plag'
Post rajdo nur per piedir'
Ho, lante pasas
Enpolve rampas
Tre-tre malfacile foriras plag'

Tamen alvenas la konsol'
Kiun fortigis la esper'
Miĥaelo Kolhaas
Pelas la plagon
En la terprofundon li pelas ĝin

Ekbrilas tago de la ver'
Se estas brava kuraĝul'
Luktanta por ĝi
Per fajro glavo
Miĥaelo Kolhaas la arkanĝel'

Traduko de Imre Szabó

Ĉu estis ĉu ne la fato
Nigre flugrajdis la fato
En Kolhaasenbrück
Sur komerciston
Mikael' Kolhaas frapis fato.

Fulmhaste venas la fato
Stalone sturmas la fato
Ho ĉar sen invit'
Kaj sen anonco
Nigrefluge rajdas la fato.

Sed tire pasas la fato
Venis rajde iras paŝe
Ho tire pasas
En polvo rampas
Maleme nin lasas la fato

Sed alvenos ja konsolo
Al senĉese esperanto
Mikael' Kolhaas
Ĉi glavanĝelo
Terprofunden tretos la faton.

La tago de l' justec' ekhelos
Se iu spite pledos
Fajre kaj glave
Kiel Mikael'
Kolhaas batalis la arkanĝel'

Traduko de Jozefo Horvath

Miklós Radnóti:
Kvara eklogo

POETO :

Nur demanditus mi kiel embrio...
Sciis, mi jam sciis, kiel nun!
La mondon ne! ĉar kruda! – ploris krio,
dampe frapas min la ombro, tranĉas min la lum'!
Mi restis viva. Duras jam kranio.
Fortiĝis pulmoj pro la larĝa plorario.

LA VOĈO:

Vin ĉiam al la bordo trudis
la ruĝaj ondoj de morbilo, skarlatino.
Vin foje volis gluti lago – tamen vin elsputis.
Kion vi pensas, kial ŝirmis tempo vin en polmo?
La kor', hepato, la du-ala pulmo,

la suka kaj enigma maŝinaro
vin servas... kial? la terura lonicero,
ne plektas vian karnon la kancero.

POETO:
Naskata mi protestis. Tamen estas jen mi.
Plenkreska. Vi demandas: kial? Mi ne scias.
Mi revis esti ĉiam nur libera,
inter gardistoj mi nun letargias.

LA VOĈO:
Vi marŝis pintojn brilajn en la ventoj,
kaj vidis, versperiĝe, inter la arbustoj
ŝrumpantaj surgenui mildan kapreolon,
vi vidis rezingutojn sur sunplenaj arbobrustoj,
virinon junan nuda el rivero borden paŝi,
surflugis foje vian manon la lukano…

POETO:
Kaptita mi eĉ tion ne plu vidas.
Fariĝi monto, herbo, birdo mi avidas...
konsola papilio-penso,
diiĝo pala. Helpu min libero
patrujon trovi de la menso!

La pinton, boskon, junulinon kaj arbustojn,
flamventon de la flugilpar' anima!
Kaj renaskiĝi por la novo monda,
kiam en orvapora bril' sublima
aŭroron vekas suno alvenonta.

Silent' ankoraŭ, sed jam ŝtormo spiras,
maturaj fruktoj lulas sin sur branĉoj.
La papilion pelas milda forto.
Inter la arboj jam blovetas morto.

Mi scias jam, por mort' mi maturiĝas,
min levas kaj faligas tempo onda;
kaptita estas mi kaj solo kreskas
lantete, kiel ŝvelas lun' ekronda.

Libera estos mi, la tero min absolvos,
la mondo frakasita supertere lace
flametos. La skribotabuloj diskreviĝis.
Ekflugu per flugiloj pezaj mens' aŭdace!

LA VOĈO:
Sin lulas frukto, falas se matura;
vin trankviligos memorplena, mola tero.
Sed skribu de l' koler' per fumo – se la dura
terglobo diskreviĝis – sur ĉielo!

Miklós Radnóti:
Fragmento

Ĉi-monde mi epokon vivis,
kiam la homo iĝis tiel fia,
ke murdis li pro ĝu', ne nur pro dikto,
miskredojn fide furiozis en eraro,
obsedis vivon la trudpensoj de fatalo.

Ĉi-monde mi epokon vivis,
kiam meritis laŭron nur denunco,
la murdrabistoj, perfiduloj regnis, –
kaj kiu estis muta, ekzaltiĝi pigra,
jam tiu estis malamata pesto nigra.

Ĉi-monde mi epokon vivis,
kiam kritiki bravaj devis fuĝi
kaj pro la honto mordi siajn pugnojn, –
deliris en horora fato tuta lando,
ridaĉis en ebrio de malpuro, sango.

Ĉi-monde mi epokon vivis,
kiam patrinon damnis ŝia filo,
kaj ĝojis la virino pro aborto,
vivant' sopiris kadavriĝi vermoplena
dum ŝaŭmis sur la tablo glaso densvenena.

……..
……..

Ĉi-monde mi epokon vivis,
kiam silentis ankaŭ la poeto,
atendis, eble ekparolos nove, –
ĉar damni inde povas ne alia, –
scianto de l' terura vort': Jesaja.

Lőrinc Szabó:
Nokto bulvarda

Nun kion fari, al vi kion diri?
Mi sopiras vin, sed la amoro, verdire,
malmultas por logi min altire,
kaj eĉ ĝis nun tial mi estis amema,
ĉar vi estas alia, freŝa kaj graciplena.

Mi malgracias kun laco vana,
kaj aĝo infana
fonas tiel nigre miajn jarojn,
ke ĉie mi vidas nur la monerojn,
mizerojn

de falintaj sortoj ili borderas.
Veras,
mi pensis pri vi nokte (pli bele
neniu povas pensi pri virino)
kaj en la februara blua frost' sufere

dudekjaraj ĉifonaj bestuloj
truis apud mi la vojon.
Leviĝis la ferkovrilo: putraj fetorturoj
frapiĝis alten turniĝantaj en blanka nubaro
el la asfalto, el la grandkanalo:

ili nur vadas ĝis maleoloj-kubutoj
en la koto de l' intestoj, martelas,
filoj de Kristo, kaj kverelas
kiel patroj kaj filoj de ĉi brutoj.
Minutoj

viciĝis longe dum mi subteren rigardis,
kaj pri vi pensis mi amsopira,
kaj nun mi kredas: por mi la
amoro malsufiĉas vere.
Vortoj puliĝis supren de subtere:

komando, sakrado, ŝerco kaj ridaĉo –,
Ĉu vi ne aŭdis ilin? Vi en mia sino
povus ja aŭdi, en mi vi kiel animo,
vi povus aŭdi, tiom sentis vin la pensoj amaj
kaj mi sentis: se ĉi-samaj

manoj satanaj,
malpuraj, sangaj, tetanaj
frapus al mi vizaĝen, mi senmovus,
vin tiom fremda por mi
pretus mi abrupte formi,

el la apertaj intestoj de Budapeŝto.
Ŝanceliĝa ombro enmane kun lanterno
descendis sur eskalo, mi gapis kun konsterno
kaj vidis, kio estas muĝanta tie for,
ĉi subtera fervoj',

tiu inundo, kiu tie profunde
vomas kaj ŝaŭmas abunde,
kiu trakurante la pusajn volbarkojn
tralavas de interne la eternajn
palacojn kaj stomakojn.

Dudekjaraj ĉifonaj bestuloj
plenumis tion en la submondo,
kion oni ja plenumi devas,
kaj por mi kompreniĝis la plendo,
pri kiu ili jam eĉ pensi ne revas,

se tiam estus vi kun mi, kaj la samaj
sangokaĉaj manoj satanaj
atakus vin
por disdividi inter si vian korpon blankan,
mi envion ne havus, eĉ ne flankan

al ĉi povraj brutoj: eĉ movoj
replikaj
ne ekvibrus por savi vin kontraŭ ili, kaj
mi nur starus aŭ pluirus angore,
kaj kun, mi ne scias, kiom da mortoj enkore.

Nun kion fari, al vi kion diri?
Malsufiĉas am', kareso,
kaj por kaŝi, kio mavas
eĉ vi ne sufiĉe havas
fortojn, fion plu, forgeso.

Zoltán Zelk:
Violono savita el fajro

Per violono flammordita
kion fari, povra cigan'?
ĉu vi magios kanton per ĝi,
ĉu adobon formos la man'?

Trezoro via frakasita,
ligno karba, pendas la kord',
sed provu, eble ĝi eksonos
kun l' amara, plora agord'.

Ĉu kordoj ŝnure riparitaj?
tamen eble! provu povrul',
ceteron se ne, por ĝemplori
la minuton de l' kabanbrul',

kiam pepante furioze
la freneza hirundopar'
por savi siajn idojn
flugas al tegmento-flamar',

kiam vi hojlis kun la hundo
la pereon – en mondekstrem'
ke grincu via cigansorto
kun la praa kanisa trem'!

Tion priarĉu, ĉi-minuton,
poste dormu ĝis la malsat'
vin dormi lasas, ĝis l' oldiĝo,
ĝis la sterko-, koto-ŝprucad',

en argilkav' vi nostalgios
pri pasinta lud' kun angor',
memor' surfalos vin flugcindre
kaj dikiĝos fulg' sur la kor'...

Zoltán Zelk:
Dek kvar versoj

Ke via korpo ardas tra la morto,
tra dumil noktoj da solula sorto,
ke ami vin mi senjuste aŭdacas,
ke klošon de orfeco vi frakasas,
ke koro sangas pro la vitra falo,

ke min perfingre montras la tombaro,
ke por mi, olda hom' ne estas stelo,
alia virto, nur la juna belo,
ke frostaj noktoj gvatas al aŭroroj
de viaj glata ventro, brilaj kruroj,
mi kvazaŭmorte dormas dispalpebre,
ĉar via brilo super mi ne ĉesas,
rosigas min felicxo kiel ŝvito –
tiel belege estas! Neelteneble!

István Vas:
Kiam la rozoj ekodoris

Ĉu vi memoras? kiam rozoj ekodoris
ne plu estis ni jam junaj –
domon tombokrucoj ĉirkaŭfloris;
en kor' mortintoj kunaj.

Ni sciis: nur ŝtelaĵo la felicxo,
kvankam edzo kaj edzino
rigardas, kiel pompas la rozuja ricxo,
ame en animo.

Grizigis multaj viaj haroj tiujare –
memoru! kaŭzoj gregis.
Sed kiu restis nigra, tiu malavare
pli ol iam brilegis.

Al vi en la okulojn, ĉi spegulojn de admiro
rompitajn lumojn kaŝis la teruro,
kaj konfuzigis tie la purverda brilo,
sed pli dolĉis ĉi nebulo.

Matene ni vekigis kun jubilego pia,
vi pro l' ĝarden', mi pro vi –,
kaŝigis milde dum tiu somero nia
Anglio, Veneci'.

Kiel aldonon strangan, dangxeran foran foron
la morgaŭon ni suspektis –
tiusomere estis: al vi en la koron
la vintra vent' sin plektis.

Antaŭe estis por ni pli gajaj someroj,
memoru! sed bela ĉi solis.
En la ĝardenon klinis sin la mutaj tombejoj…
kiam la rozoj ekodoris.

Sándor Weöres:
Hortulan' sur brancxo ora

Hortulan' sur brancxo ora,
eta kant' sur fiuto mola,
ŝafo en la alto fora
kanton saman citras sola.

Pom' enkora – rugkolora
sur brancxaro pompe flora.
Al la peta vok' elkora
jen donaco la bonvola.

Sándor Weöres:
Saturno en descendo

Omaĝe al T. S. Eliot

La grego de mi forprenita. Ĉu bedaŭri? Plu nek devo,
nek respondeco: en azilo jam facilas la oldula vivo.
Unue estis forpelata la misvorta pastro kornornama
de la podio, kie li ĉielen soris ĉiutage – la stultulo! –
kaj selektiĝis pastroj plie saĝaj; poste sekvis la savanta reĝo
la nesavata, kaj dungiĝis glavotenaj reĝoj; poste la saĝulo,
ĉar havas ni sufiĉe da saĝuloj; fine la poeto,
kial li nombras fingrojn balbutante? Ja ariĝas anstataŭ li
kantuloj komisiitaj, celkonformaj al la postuloj.

Jen staras mi vizaĝe al la muro, kun rompita baston' paŝtista.
Sin tretas mia grego ĉe la trogo: kiom da freŝnovaj, gajaj
grandiozaĵoj flosas en ĝi! Nazo apud nazo, nazo nazon
forpuŝas – ĉu bedaŭri? – ne plu mia profesio,
dentego min trapikas vide: kio estos pro l' enorma
multiĝo, pro utero kuretita, pro vorema narkozo,
pro elano akceliĝa, murda radiaro, eksplodo
metita sur la sojlon.

Kiel sur la reloj trajno
kuregas al abismo malhavanta transan bordon –
ĉu mi bedaŭru? – eble estos ĝi bremsita lastminute;
aŭ super la abismo arkas vojo, nur mi blindas;
eble birdiĝos ĝi, forflugos kun abrupto krutaĵrande:
ili mem scias, mi ne. Ilia zorgo la nescio.
Egale jam por mi: rompita mia baston' paŝtista,
facilas kuŝi sur la pajlo por ripozi
laciĝon de miljaroj. Min ili ne vidas: kapoj en la trogo,
ankaŭ mi vidas nur iliajn postaĵvangojn kaj orelojn flagrajn.

Rudolf Varga:
Fuŝtempo
– Fragmento –
(Bitangidő)

...en la vivsajna morto sole nur la perdinto povas dormi
trankvile, nur la perdinto povas monologi trankvile,
maĉi sian koleron trankvile, nur la perdinto
povas songi trankvile, nur la perdinto povas perdi trankvile,
nur li, li povas vojaĝi kun alten levita kapo, kun senpaga bileto
de malhavo, kun haketita vivo, haketitaj
nervoj, en la lignobenka veturo de la historio, tiel,
tiel floras la ombromondo, nur, nur la nuligiton,
la prirabiton, nur lin vivigas la tero,
en kiu oni kaŝas trezorojn kaj mortintojn, nur la perdinto
povas silenti trankvile kun terplena buŝo sube, nur
li povas trankvile kuŝi en la beglobruna korio, kiel
Jesueto en Betleĥema kripo, Oĝotempo scias,

finitaj la esperoj, ĉar, ĉar li jam, ĉar li tion, tion, kio
ekde nun sekvos, tion li ja eĉ aŭdi ne
volas, eĉ palpi ne, eĉ scii ne volas, eĉ vidi
ne volas, kiam prezentos sian teruran, krimulan
vizaĝon la vero, nu! sufiĉas tiom por hodiaŭ,
Oĝotempo kverelmurmure lamas hejmen, malaperu, for! li lamas
hejmen en sian kavernon, li enrampas tra malantaŭaj enirejoj
de ekstremforoj, tra servistara ŝtuparo de la altoj,
tra spiralo li sin trenas reen en stelojn,
supren, ĝis la plej supra etaĝo, kie lin atendas sojlekuŝe
lia hejme lasita hieraŭo, Oĝotempo sin kaŝas
en sia netrovejo, li enkuŝejigas sin ekdorme, kaj ĉe mortopunkto
de vigileco li atendas eksoni nevideblajn kordojn,
li pjaspas la hodiaŭajn spertojn, nebezone cetero, ne bezone cetero,
nur ami, kaj ne permesate iam juĝi laŭ la strabaj
leĝoj, ĉar nek nigra, nek blanka, nur
nigrablanka, nek bona kaj malbona, nur bonamalbona,
ne ekzistas io tia ĉi, nek tia, nur tiakia,
la mondo, la mondo estas konstruita sur ordo de ĥaoso, kaj
frenezas tiu, kiu kredas trovi logikon, ie ajn ajnan logikon, neniu
scias ion, kaj bonas ĉio tiel, kiel, ĉio okazas en la
animo, en la animo, en ĝi, ekstere surstrate batalas
la solalasita homaro sian paranojan malvarman militon, sian vepromiliton,
amatorfabrikas sian atombombon, ĉioegale, Oĝotempo ronkas,
entombigas vintron, pasis jam Epifanio, tamen tial, ĉar nun dormas,
dormas Oĝotempo, tamen li ekzistas, tamen li spiras,
kaj tiel endorme li trankviliĝas, tiel cetere tute bone,
tute bone estas ĉi tie, aliflanke baldaŭ Senviandiga Mardo,
Cindromerkredo, komenco de Karesmo, kaj li dormas ankaŭ plu
antaŭ la susuro de pereigo,
antaŭ ol movos siajn manojn la Reĝo de Timtremo,
tiun, tiun ĉiu scios, estos signoj
en Suno kaj Luno, tiu estos, tiu estos komenco
de la brilo, kiam la Finohava ekpinĉos siajn kordojn,
kiam fine ankaŭ, ankaŭ li eldiros
sian neeldireblan sekreton, kiun tuŝi povas
nek vortoj, nek matematikaj formuloj,
nek, nek, nek
la kruela imago..

Rudolf Varga:
En printempo neniampasema
(Sosemmúló tavaszban)

Frédi!
mia okulbrilo, dignoplena gregestro!
dankon, ke vi elektis min.
Ne timu, ne angoru!
Ĉenon, buŝumon, kondukrimenon,
subhaŭtan identigan ĉipon
neniam mi permesus.
Kaj, se foje,
foje tamen, tamen

vi perdiĝus, nepre vin retrovos,
retrovos la providenco.
Cetere, vi scias, ĝis nun
ĉiuj iĝis nebuloj la fuĝintaj
lupoj, ili iĝis nuboj surĉielaj, kie
fine, fine jam vere
ili liberas.
Ili liberas, kiel post ektondro
la pafo, kiel la ekbrila,
nenieekzista ŝtalpafaĵo.
Frédi, okulbrilo mia!
Fred! Fredo!
estis tiom, estis tiom
eble,
kion mi povis fari por vi, kvankam, eble
refoje mi povos deklami poemon al vi, kaj,
kaj mi povos kanti soldatkantojn tre-tre
malnovajn.
Vi ne volis homiĝi,
do mi hundiĝis...
Egale, nu.
Foje, se ankaŭ vi mem
pensos tiel, pli bone estos
eble, pli bone estos
paki, propravole paki
for de ĉi tie, for de ĉi tie.
Rapide!
Ek, forpakiĝi,
ĉar la vagantajn
lupojn nun ĉiujn, ĉiujn
oni kaptos, kaj per dormigaj injektaĵoj
ĝis la lasta, ĝis la lasta ĉiujn
oni ekstermos.
Okulbrilofrédi! Alfréd!
atentu, ne ĉagrenu!
Sciu, tio ne estas virdigna.
Ne malgajiĝu!
Vi scias, ni ĉiam
kune.
Kaj se iutage
en laktoblanka smogo, en reeĥa, surda
silento
kaj vi,
kaj mi,
kaj mi,
kaj vi,
eble, eble, probable, tamen,
tamen malaperus, tial, tial
ankoraŭ vi ne ĉagrenu!
Vi scias, ni renkontiĝos.
Ni renkontiĝos ankoraŭ.
Ne timu!
Ni renkontos nin en pli feliĉa

mondo, en pli feliĉa
mondo, en hundoĉielo,
sur ventkurataj herbejoj, prerioj,
kie sen pezaĵoj,
sen pakaĵoj, sen nepagitaj ĉekoj,
sen hundbelulinoj,
enpoŝe
nur kun skatolo da cigaredoj, da alumetoj,
en iu,
en iu,
en iu
pli feliĉa mondo,
ni duope kune,
eterne kune, kune vagados,
vagabondos, migrados
en printempo neniampasema,
en leporpela svinga somero.

Printempa vento

(Tavaszi szél…)
Hungara popolkanto

Vento l' akvon jam ŝveligas,
floreto, floreto.
Ĉe birdetojn am' kunligas,
floreto, floreto.

Kaj al kiu min mi ligu,
floreto, floreto?
Vi al mi vin, mi al vi min,
floreto, floreto.

Ornamitan verdrubande,
floreto, floreto,
min adoras vent' ardante,
floreto, floreto.

Ornamitan blankvuale,
floreto, floreto,
min kompatas vent' amare,
floreto, floreto.

Dezső Kosztolányi:
Kristnasko

Descendas la Kristnasko arĝentpluve,
muĝas la forno, densas la neĝblovo,
lamplumo sur la kukoj oras brule,
giras ĵetkubo, varmas laktodoro.

Kiuj forestis, ĉiuj nun kunadas,
kaj ili babiladas dolĉavorte,
dum dise la glaciajn kampojn gratas
vintro per bluaj, akraj ungoj forte
.
Abiodoro enaere krozas,
arĝentspegule la Kristarbo pozas
amiko vin regalas vinokruĉe.

Kaj zumas pia kanto staniole,
sur neĝa pusto ie, mutafore
lokomotivo svagas ek-ekmuĝe.

Tradukaĵoj el la kantaro Hozsanna

****

N-ro 20: Gregopaŝtistar'

(Csordapásztorok)

Deák: Kantkolektaĵo (1774) –
Kisdi: Cantus Catolici (1651)

1. Gregopaŝtistar', kiam Betleĥeme
//:gregojn paŝtas jen nokte surebene.://

2. Dia anĝelar' venis el la foro,
//:kreskas granda tim' en ilia koro.://

3. Diras ĝojon mi, diras ĝojon grandan,
//:havas Savon vi, Savon naskiĝantan.://

4. Iru tuje tuj en la urbon foran,
//:tie trovos vi Jesueton ploran!://

5. Ekis ili tuj kaj kiam eniris
//:al Maria jen "Bonan tagon" diris.://

6. Dio portis vin al via Sinjoro,
//:sed ne eblas nun via alparolo.://

7. La traduko nefinita.

N-ro 21: Estu glor'!

(Dicsőség...)

Zsasskovszky: Kantaro (1855)
Jukundián Simon

1. //:Estu glor'! alte al Di-Sinjor'!://
Gaje sonas el ĉiel' pia kanto de anĝel:
Estu glor!, estu glor' al la Di'!

2. //:Estu pac' monde por la homar!://
Kiun la Di-ama kred' gvidas al Jesuet'!
Estu pac', estu pac' por homar'!

3. Anĝelar', kun ni kantu pri glor'!
Paŝtistar', kunu ni en ador'!
Al la Dia etinfan', pri lia senlima am'
sonu glor' kaj ador', sonu ben'!

4. Jesuet' ne malestimu nin,
sendas ni peton el la anim',
votas ni kun firma ĵur', ni senkulpe vivos nur!
Jesuet', aŭdu nin kun indulg'!

5. Estu glor' al Patro kun admir',
estu glor' al la naskita Fil'

kaj al la Sankta Spirit'!, graco de Dia egid'!
Estu glor', estu glor' al la Di'!

N-ro 23: Dia Filo

(Istengyermek)
Kapossy: Ekleziaj kantoj (1887)
Pakocs Károly

1. Dia Filo, kiun graco donis al la ter',
mi oferas al Vi nun kun kanto de anĝel'.
Ho, min savu Via man', en mi plenu Dia am'
traanime kaj trakore dum Via ador'.

2. Eĉ sen vidi la vizaĝon de la infanet',
Vi ĉeestas jam tutcerte, firmas mia kred'.
Vi ridete viŝas for miajn larmojn post la plor',
kiujn portas mi donace al la kripa tron'.

3. Dia Filo, mia koro ardas pro dezir'
doni ĝojon Vi potencas, nur Vi, Dia Fil',
nur Vi sola, Sankta Di'. Ho, kiam aperas Vi
en la formo de hostio, mi feliĉas jam.

4. Per la bril' de Betleĥema stelo kovru min,
kiu serĉas Vian kripon en nokt' de anim'!
Kredon oru Via bril', donu fortojn por la ir',
kaj tutcerte mi alvenos Vian tronon jam.

5. Ĉe la kripo gardostaros mi kun sinofer',
ke neniu Vin ofendu sur la vasta Ter'.
Kontraŭ ploro kaj dolor' Vin mi ŝirmos en la kor',
kaj azilon al Vi donos mi dum tuta viv'.

N-ro 25: Venis el alto

(Mennyből az angyal)
Kolektaĵo Gimesi (1844), Szentmihályi: Kantlibro (1798)

1. Venis el alto al vi, pastistoj la anĝel', la anĝel'!
En Betleĥemon urĝe rapidu al la stel', al la stel'!

2. Filo de Dio, kiu naskiĝis en la stal', en la stal',
Li ja mem estos via Savanto en real', en real'.

3. Sidas Maria, Sankta Patrino tuj apud, tuj apud,
kuŝas la filo en la spirvarmo de la brut', de la brut'.

4. Ili tuj iris por lin saluti al la for, al la for.
Ili kunportis belajn donacojn en la kor', en la kor'.

5. Etan Jesuon ili alpreĝas kun honor', kun honor',
Dio-Sinjoron ili majestas kun ador, kun ador'.

N-ro 29: Ho, vi belega

(Ó, gyönyörű szép)
Kolektaĵo Gimesi (1844)
Ilona Cziké né Lovich

1. Ho, vi belega nokto de mister'!
Vi, rozpetala bebo de ĉiel',
Dio kiel infanet'
kuŝas kripe en kviet'
nokte de Kristnasko.

2. Neelĉerpeblas, ho, Vi, Dia am'!
Blanka hostio, eta tritikpan',
en ĝi jen la Di-Sinjor'
por vi estas la konsol' –
mondon ĝi valoras.

N-ro 195 Estas vi ĉi-tere nia gvida stel'

(Te vagy földi éltünk)
Kantaro Zsasskovszky (1855)
Béla Tárkányi

Estas vi ĉi-tere nia gvida stel',
Sankta Virgulino, estas vi esper'.
//:Dia Filo al ni donis por patrino vin,
ni ĝojante vin adoras, Sankta Virgulin'!://

Estas matenstelo vi en vivmaten',
vin ni sekvas ĉiuj dum la vivopen'.
//:Dia Filo...://

Esperstel' vi estas sur la vivomar',
vi trabrilas ĉiujn nubojn de l' amar'.
//:Dia Filo...://

Vi nin alridetas, esperdona stel',
se en diokredo rompas nin sufer'.
//:Dia Filo...://

Se alproksimiĝos nia viv-vesper',
estu konsolanta nia vesperstel'.
//:Dia Filo...://

N-ro 204: Ho, reĝino por ĉieloj

(Királynéja az egeknek)
Kisdi: Cantus Catholici
Remig Bodnár

Ho, reĝino por ĉieloj,
por la aro da anĝeloj!
Havu benon kaj adoron,
ĉar vi naskis Redemptoron!

Ho, patrino, ĝoju glore
kaj nin ŝirmu ĉielfore!
Vin ni petas kun admiro,
nin indulgu via Filo!

N-ro 280.B: Venkon Dian

(Győzelemről énekeljen)
Koudela Géza, Bangha Béla

1.
Venkon Dian kune kantu
oriento, okcident'!
Di-adore sin kunfandu
ĉiu koro, ĉiu sent'!
Kristo venis en homrondon
migri kiel samsortan',
ĉar li amis tiun mondon,
li sin kaŝis en la pan'.
Kristo regas niajn korojn,
sankta vino, sankta pan',
la naciojn kaj popolojn
kunpacigu via am'!

2.
Homakorpe li aperis,
venis kiel infanet',
savon li por ni liveris
per sangversa elaĉet'.
Sur Golgoto nun altara,
sankta sango perlas jam,
Di-ŝafido, savo kara,
Krista korpo estas pan'.
//:Kristo regas...://

3.
Sonu do la kanto danka,
tra vastejoj flugu for,
al la Dio nin amanta
en eterno estu glor'!
Tuta tero la altaro,
niaj korpoj florornam',
incensfume la psalmaro
nia kredo, nia am'.
//:Kristo regas...://

4.
Orfa tribo de Stefano,
frunton klinu al la ter'!
Malaperos en Di-amo
ĉiu zorgo kaj sufer'
Kruco estis dum miljaroj
sankta signo de esper',
restu ĝi en Viaj faroj
garantio de l' prosper'!
//:Kristo regas...://

Gábor Képes:
Barieroj niaj
(Sorompóink)

Posakege aĉetitan lavpulvoron versas en Danubon viro kun larmaj vangoj
iu alia staras ĉe bariero
povus esti simbola ago ankaŭ la knabino staras tie
persue ili frotas la betonon
supre ŝaŭmaj nuboj
fone preĝejo
sangomanka ino adoras kronon
meze sidas la Reĝo de ĉieloj kaj apude
fieraj skitoj el galmlsanaj ĵurnalvendistoj
la knabino atendas haste surprenita grafitkolora kardigano
surtrotuare infanaro en orditaj vicoj
en ŝarĝaŭto vestaĵoj aĉetitaj laŭpeze
la viro atendas vane la negoco nefarita
li forire salutas la knabinon
Ni trinkas lakton la difektita koro revarmiĝas
niaj jarmilturnoj ternataj unu sur la alia
por neĝblanka ĉevalo ni vendas la knabinon

Gábor Képes:
Dudekses kaj duono
(Huszonhat és fél)

Mi povus loĝi pordoproksime de vi
vi transvenus al mi ĉiam
vi pruntepetus salon koron
kaj mi donus da ili al vi ĉiam
la vivo estus freneza
kaj funge simpla
la poezio lila indigopapero
Mi ŝatus vivi ĉar kafodoro estus
la kurteno duone fortirita ĉiam

viajn okulojn ne ĝenus akra sunbrilo
la salon desur via vizaĝo mi forlavus ĉiam
Kiam vi envenus ĉiam ni kaŝiĝus unu en la alian
vi forirus sensalute ja vi salutfapetos matene
se tiel estus nokte mi ŝatus dormi
kaj en miaj sonĝoj la pordoj apertus
kaj neniam mi finus la poemojn al vi
prefere mi petkaŝus ilin en viaj oreloj
sinsekve laŭvice en kapbalanca vespero
kaj la poentojn vi fuŝridus ĉiam

Gábor Képes:
Dusenca aludo
(Kétértelmű célzás)

Plene disrompiĝis kaj tiun malmulton da defalaĵoj
diligentaj manoj dummomente forpurigis
tia estis ĉi-jarcento kun nespertita apetito
ĝi voris la homkadavrojn kaj disdonis kun enorma prodigemo
vivon kaj esperon – klaris kaj akris
kie disrompiĝis streĉiĝis la splitoj
ĝuste okdek feliĉaj novaj jaroj
ioma hezito ĉu ekde nulo aŭ ekde unu
do ni kalkulu kune kvinono
da ekscito ŝparitaj ja ni
samtempe naskitaj kvazaŭ samus
Ek al aventuro kaj se vi ekas mi vidas
brilas la lumo vi faras fajrojn dise nescie
la urba nebulo dissolvos viajn obstinajn fumsignojn
neniu alia signo kaj pri ni vi ne scias
jen aventuro por vi esti for de mi
aventuro por mi serĉi vin kaj dume
ĉiuminute nova dozo de segpolvo deŝutiĝas
La fino estas trans la jarcento kvar kvinonoj da vivo
se mi vokas vin sonoras kaj se sonoras ĉiam
mi vokas vin la fumo obstinas sorbis ĝin ĉiuj miaj vestoj
kiu malgrandas nun tiu grandis iam
kaj ne plu iuj grandas
kaj se ne estas mezo trovu la randon
mansigne salutu foj-foje mi petas
de trans la oceano – min

La poemoj ne rajtas esti kopiataj kaj publikigataj sen la permeso de la aŭtoro aŭ jurheredantoj.

Italigoj de Lina Gabrielli

****

Imre Szabó:
Se qualcuno ti comprende

Se qualcuno ti comprende
si fa più vasta la serra di fiori,
con un abbondante mazzo di odori
e un diafano blu,
carezzato dal cielo
saturo dal verde che è giù.
Quasi nobilitando te stesso.

Tu senti
che'l animo muscoleggia.

Tu ti libri leggero
sul periglio
come gli angeli
intoccabili.

El Esperanto: Lina Gabrielli

Imre Szabó:
Si levava la soglia

Stavamo accoccolati sulla soglia
e la soglia si levava
su, su, ad altezze supreme.

Sotto di noi rimpicciolivano
i troni, le torri,
sebbene fossimo i più piccoli
accoccolati sulla soglia.

Ora anche le nubi, le nebbie,
i dubbi, le angosce,
il denaro, il giorno,
la luce e il buio rimpiccioliscono
come una macchia che appena si vede.

Noi scrivevamo, creavamo
e sentivamo la mano di Dio
sulla spalla.
Udivamo il ronzio diafano delle sfere.
Dio ci parlava, suonava gioia
nella sua voce
per la nostra audacia di operare
e partecipare al suo grande lavoro
di creazione del mondo.

El Esperanto: Lina Gabrielli